Visby havas multajn vidindaĵojn kaj nia programo ampleksis ankaŭ vizitojn en la malnova, interesa katedralo, en "Fornsalen", la plej granda provinca muzeo en Svedlando kaj en la bela Botanika Ĝardeno, kie interalie kreskas arboj el suda Eŭropo ekz. platanoj, cipresoj kaj migdalujoj.

Snäckgårdsbaden, ekster Visby, estas ĉarma banloko kun kalkŝtonaj rokoj

kaj vasta sablobordo kaj tie ni refreŝigis nin en la ŝaŭmaj ondoj.

Satata plezuro estis serĉi surborde ŝtonigitajn restaĵojn de pratempaj bestoj kaj kelkaj entuziasmuloj kunportis hejmen vere unikan petrifikatan kolekton.

Per aŭtobusoj ni iun tagon ekskursis al la norda parto de Gotlando. "Kie do estas la ŝafoj?" riproĉe demandis angliano, dum ŝia rigardo serĉe vagis tra la pejzaĝo preterfluganta. "Ni jam tiom longe veturis kaj eĉ ne unu ŝafon mi vidis." — Ne, ŝafojn ni ne trovis — ili eble kiel ni, libertempis — sed aliajn pli kuriozajn vidindaĵojn, kiujn nomas la gotlandanoj "raŭkar", t. e. blokoj de kalkŝtonaj rokoj, havantaj la plej strangajn kaj fantaziajn formojn. En Lickershamn ni trovis veran egiptan sfinkson kaj faris la agrablan konatecon kun "La virgulino", la plej fama "raŭk" en la tuta Gotlando kaj objekto de multa admiro. Ĝi montras per iom da fantazio de la rigardanto la konturojn de virino, en krinolino vestita.

En Irevik ni banis kaj trinkis kafon kaj poste daŭrigis la veturon al Elinghem, Tingstade kaj Bro, kies malnovajn interesajn preĝejojn ni pririgardis.

Ĉio havas finon, ankaŭ postkongresa vojaĝo. Ŝajnis, ĉe nia forveturo, ke la tuta Visby-anaro estas esperantigita, ĉar la kajo estis plenplena de homoj, kiuj, kiam la ŝipo debordiĝas, gaje svingas la manojn kaj ĥore kriegis "Vivu Esperanto, vivu Esperanto!"

— — — — —
La lumoj el Visby palpebrumas. La ondoj dormige kantetas.

Adiaŭ Visby! Adiaŭ fabela insulo! Mi esperas baldaŭan revidon.

Ella Nilson.



Franska flygare lernas esperanto.

Vid Högre skolan för utbildning av flygare i Frankrike har en esperantokurs startats på initiativ av luftfartsministeriet. I kursen deltaga 60 personer, kursen öppnades av direktören för skolan general Gerard och tal hölls av direktören för franska meteorologiska byrån general Delcambre.

"Svensk afton".

På en hel del platser ha esperantoföreningarna på senare tiden anordnat något, som betecknats som "En svensk afton". Man sysselsätter sig den kvällen så mycket som möjligt med vederbörande land. Grundvalen för diskussioner o. dyl. som äga rum under kvällen utgöres av korrespondens och studier, som särskilt handla om Sverige. I Estland, Polen, Holland och Belgien har man haft dylika tillställningar. Senast har en sådan afton anordnats i Paris.

Scouterna och esperanto.

För en tid sedan gick genom pressen ett meddelande att ledningen för den internationella skautrörelsen skulle ställa sig avvisande till esperanto, ja, rentav uppmana skouterna att ej läsa detta språk. Ledningen har, säger den, ingalunda uttalat sig i antydd riktning. Tvärtom hänvisade man till att det ju finnes särskilda märken för språkkunniga skouter, och att man antagit ett sådant märke även för esperantisterna inom kåren.

Spårvägen och esperanto.

Stockholms spårvägspersonal har under hösten anordnat en utställning av material rörande spårvägsväsendet i en mängd städer inom och utom Europa. Materialet, som verkligen kan sägas vara imponerande, har införskaffats tack vare esperantoförbindelserna. Spårvägsbolagets direktör höll själv ett anförande vid öppnandet, varvid han underströk det betydande värde esperanto har.

HOW DO YOU DO? France: Kiel vi iras? Germane: Kiel vi trovas vin? Angle: Kiel vi faras? Itale: Kiel vi tenas vin? Ruse kaj Nederlande: Kiel vi vivas? Svede: Kiel vi povas? Ĥine: Kion faras via stomado? aŭ: Ĉu vi manĝis vian rizon? Egipte: Kia estas via stato? Perse: Via ombro neniam malgrandiĝu! Esperante: Kiel vi fartas?

(El "La Suda Kruco".)

Esperanto som språkstudium.

Esperanto förmår att i mycket hög grad levandegöra de grammatiska begreppen. Tack vare esperantoordens ändelser komma orden att för eleven framstå som en direkt illustration av det grammatiska begreppet. Detta i och för sig är abstrakt och icke lätt tillgängligt för barnet, men i esperantoordet förkroppsligas det och blir till åskådlig verklighet, icke på tusende olika sätt såsom fallet är i andra språk utan på ett sätt, oföränderligt liksom begreppet självt, en begreppets avbild så att säga. Om esperanto på detta sätt får levandegöra de grammatiska begreppen, kommer detta givetvis all språkundervisning till godo, icke minst undervisningen i modersmålet.

Ovan sagda gäller naturligtvis även för äldre personers grammatikstudier, exempelvis inom studiecirklar. Så har jag t ex. lagt märke till att de, som genomgått en god nybörjarkurs i esperanto, behärska modersmålet bättre än de, som genomgått en motsvarande kurs speciellt i modersmålet, härvid givetvis räknat med samma kunskapsnivå hos båda parterna vid kursens början.

För språksinnets odling i allmänhet känner jag intet hjälpmedel som är så effektivt som esperanto. Själv har jag studerat tyska, engelska, franska, ryska och italienska, och jag vågar säga, att intet av dessa språk, och säkerligen inte heller något annat, ens tillnärmelsevis skärper språksinnet på det sätt, som esperanto förmår. Detta faktum är för övrigt mycket lätt att konstatera hos personer utan språklig underbyggnad, vilka lära sig esperanto. Då de komma så långt, att de något så när behärska esperanto, besitta de ofta en frapperande språklig skarpsblick. Det har ofta hänt mig, att mina mer försigkomna esperantoelever framställt anmärkningar och frågor beträffande sådana felaktigheter eller misslyckade formuleringar i svensk text, vilka mången person med språklig underbyggnad skulle halka förbi.

Ur en artikel av *Stellan Engholm*.

— Ĉu vi ĉiam balbutas tiel?

— Ne, nur ki-kiam mi pa-parolas.

Infaneto.

De *Bo Bergman*.

*Infaneto ĉarma, infaneto mia,
infaneto kara, ĉio estas via:
koron kaj penson kaj tonon, kiu sonas
kara infaneto, ĉion al vi mi donas.*

Ĉu vi volas sunon, infan' de mia kor'?
Suninfano, kisu min, kaj poste iru for:
*Malhelo estas ĉio, kion mi havas por ni,
mia kara infaneto do iru for de mi.*

Vi restas ankoraŭ infano karesema?
La profunda malhelo ne faris vin timema?
Mi estas tre malgaja kaj pli forta ol vi.
Sed mia infaneto nur ridas gaje al mi.

*Infaneto bela, printempa vento gracia,
la herbejoj floras sub dancopiedo via,
suno kaj blueco brilas en' via okul'
lumo en la mallumo, mia ĉarma karul'.*

Trad. *Ingrid Selander*.



Tra Skandinavio.

Laŭ peto de la Haga Amatorfilmklubo s-ro J. Ravestein Jr vidigis la 31an de Oktobro en ĝia klubejo sian trian Esperantan filmon "Tra Skandinavio". La bildaro, kiu estas prenita kaj rivelita de la dirita amatoro, montras la vojaĝon de Stettin, Kopenhago, Oslo al Stockholm, la 26an Intern. Esp. Kongreson, la internaciajn kostumojn kaj Laplandon. La multnombraj esperantaj tekstoj kaj la teknikaj laboroj tiel interesis la klubanojn, ke post la prezentado oni petis multajn informojn pri Esperanto.

Jen bona propagandilo!

Ny grammofon-skiva.

"La Kantobirdaro", esperantokören, har insjungit på grammofon-skiva La Internacio och La Espero. Den blir färdig omkring 10 december, varför esperantisterna, om beställning göres i god tid, till jul få nöjet höra Internationalen och La Espero av blandad kör. De två sångerna äro arrangerade av körens dirigent, Herr Karl Nordström, och grammofon-skivan utkommer på Sonoras förlag. Se vidare annons i denna tidning.

Sekretoj

de la esperanta gramatiko.

H. Seppik.

2. Akusativ.

3. Akusativ i svenskan.

I svenskan är ordföljden vanligen rak, d.v.s. subjektet sättes *före* verbet, objektet *efter* verbet. Akusativen utmärkes i svenskan icke med någon särskild ändelse, utan det framgår av ordens ställning i satsen *vilket* ord som är objekt. Men även här förekomma särskilda akusativformer, nämligen av pronomina. jag, du, han, hon, vi, ni, de. Deras akusativformer äro: mig, dig, honom, henne, oss, eder, dem. (Jag älskar *dig* — mi amas *vin*; nu ser jag *dem* — nun mi vidas *ilin*; förstår du *mig!* — ĉu vi komprenas *min?*) "Det" har inte någon särskild akusativform.

Här ett annat bra sätt för självkontroll. I tveksamma fall, om ett ord är subjekt eller objekt, så ersätt substantivet med svenskt pronomen. T. ex. ni vet inte om satsen "tiu virino mi ne komprenas" är riktig eller felaktig. Översätt den då till svenska och ersätt "tiu virino" med "hon" eller "henne", allteftersom betydelsen fordrar det. Gör likadant med ordet "mi". Om svenskan är "henne förstår jag inte", så måste det på Esperanto vara "tiun virinon (henne) mi ne komprenas". Om svenskan är "hon förstår mig inte", måste det på Esperanto vara "Tiu virino (hon) ne komprenas min". Mycket enkelt, eller hur? Men observera, att de svenska akusativformerna ofta också äro beroende av prepositioner, vilket *aldrig* är förhållandet i Esperanto, ex.: till dig — al vi, för honom — por li, med henne — kun ŝi. Observera dessutom skillnaden: tillhör *mig* — apartenas *al mi*, behagar *mig* — plaĉas *al mi*, det synes *mig* — ŝajnas *al mi*.

4. Verb och objekt.

Jämför följande satser:

Li tuŝas la muron,
knabo portas la seĝon,
ŝi legas la libron,

och

li staras la muron,
knabo sidas la seĝon,
ŝi iras la libron.

Vi se, att de övre satserna äro riktiga, under det att de undre äro felaktiga. Varför? Emedan verben "tuŝas, portas, legas" och "staras, sidas, iras" icke äro av samma sort. De förra ha objekt, de senare kunna icke ha objekt. De förra äro transitiva*, de senare äro intransitiva*. Vi måste ändra de tre sista satserna till: li staras *ĉe* la muro, knabo sidas *sur* la seĝo, ŝi iras *kun* la libro. I dessa satser saknas bokstaven "n", ty "ĉe la muroj, sur la seĝo, kun la libro" äro *icke* objekt, och *endast* objekt har "n"-ändelsen.

Några *transitiva* verb: trinkas (akvon), manĝas (buterpanon), havas (monon), skribas (leteron), parolas (Esperanton), aŭdas (muzikon), rigardas (bildon), komprenas (nenion), osv.

Intransitiva verb, som *icke* kunna ha objekt: estas, sidas, staras, kuŝas, dormas, plaĉas, apartenas, iras, kreskas, vivas, loĝas, mortas, fartas, ploras, ridas, eraras, osv.

Likväl använder man i några sällsynta fall objekt även efter intransitiva verb: ĉiu iru sian vojon; tiel li vivis sian tutan vivon; li mortis gloran morton; ŝi ploris krokodilajn larmojn, ktp. Det är då fråga om några få mer eller mindre förstenade (stereotypa) uttryck.

Obs. Suffixet *-igi* är intransitivt och kan följaktligen icke hava objekt, under det att *-igi* är transitivt och gör även intransitiva verb till transitiva: la buĉisto mortigis ŝafon; tio erarigis min; patrino kuŝigis siajn infanojn, ktp.

*) Skillnaden mellan ett transitivt och ett intransitivt verb är den, att det transitiva verbet uttrycker en handling som har ett föremål: t. ex. modern *söver* barnet ("söver" är här det transitiva verbet, och "barnet" föremålet); det intransitiva verbet anger verksamhet *utan* sådant direkt föremål, t. ex. barnet *sover*.

(Forts.)



Praktisk lärobok

som en tid varit utsåld, är nu under omtryckning och torde bliva färdig i slutet av december månad. Den svensk-esperantiska ordboken är fortfarande under arbete och det är omöjligt att ännu fixera något datum, då den kan bli va färdig.

Sukceso.

Kia bela abio! La juna Vivi admire rigardas la kristarbon antaŭ si kaj avide enspiras la freŝan pinglan odoron. Imagu, ke estas Kristnasko! Kiom mirinde! Griza ĉielo pendas super blanka tero, la arbojn kovras brilaj neĝofloroj. Estas precize tiel, kiel devas esti je Kristnasko. Kaj avino jam alvenis antaŭ kelkaj tagoj, Karl Johan hieraŭ el la gimnazio kaj morgaŭ, en la kristnaska antaŭvespero, venos onklino Hanna, onklo Albin kaj la kvar gekuzoj. Tamen io mankas en la kristnaska ĝojo Sven.

Vivi enprofundiĝas en siaj pensoj, dum ŝi ornamas la branĉojn per multkoloraj globetoj, brilaĵoj, kandeloj.

Sven, ŝia iama ludkolego, nun ŝia intima amiko, en la printempo vojaĝis Francujon por kompletigi en Parizo siajn sciojn pri la franca lingvo. Vivi iom timis, ke iu ĉarma francino ŝtelos lian koron, sed ĝis nun li regule skribis al ŝi longajn, belajn leterojn, atestantajn pri liaj varmaj, profundaj sentoj por ŝi. Bedaŭrinde, ke li ne venos hejmen! Nu, la vojaĝo ja estas longa, multekosta, sed liaj gepatroj ja estas tiom bonhavaj, ke li certe, se li dezirus, povus hejmenvojaĝi. Ĉu li vere preferas bruan, grandurban Kristnaskon al bela Kristfestoj en nordo? Ĉu li ne sopiras al sia hejmo, al amikoj, al?

"Kion vi pripensas, knabineto?" demandas avino, kiu subite envenas en la ĉambron.

Vivi vekiĝas el siaj pensoj.

"Hm, hm ĉu la stelo en la suprosidas bone?"

Avino surmetas okulvitrojn sur la nazon kaj fikse rigardas la abian pinton.

"Tute perfekte, kiom mi vidas, knabineto. Sed kiom oblikve staras la kandeloj!!! — Nu, kiu prezentos koboldon?"

"Karl Johan, mi pensas", diras Vivi.

"Mi? Tute ne!" aŭdiĝas laŭta protesto el apuda ĉambro kaj aperas sur la sojlo altkreska, malgrasa junulo.

"Knabeto", diras avino kaj fiere rigardas sian nepon, preskaŭ duoble pli altan ol ŝi, "kompreneble vi devas ludi rolon de koboldo."

"Koboldo, kia infanaĵo!" Karl Johan elrektiĝas.

"Ĉu ankaŭ la donacoj?" demandas Vi-

vi sarkasme. "Mi volus vidi vian mienon, se vi ne ricevus novan piedpilkon."

"Ne disputu, infanoj!" admonas panjo kiu ĝuste envenas en la ĉambron. "Kompreneble unu el vi devas prezenti koboldon."

"Ne mi", diras Vivi decideme.

"Kial mi ĉiun Kristnaskon ŝvitu sub masko kaj en dikaj vestoj?"

"Kia disreviĝo por Bo kaj Ulla", daŭrigas avino, "se la koboldo forestos! — Nu, Karl Johan?"

"Kial ĝuste mi? Cetere mi ne havas taŭgan kostumon."

"Ho, vi eble bezonas jaketon, redingoton aŭ frakon", ŝercas Viri. "Sed mi ekhavis bonan ideon! Mi havigos al vi elegantan veston. Mi antaŭdiras grandan sukceson."

"Ĉu ne grandegan?" diras Karl Johan ironie.

— — — —

Ada, la ĉefo de la kuireja departemento, havis multon, por prizorgi por Kristnasko. Ankoraŭ ja restas amaso da farajoj, la kuirkameno estas plena de stufujoj kaj bolpotoj, sed tio ne malhelpas, ke ankaŭ ŝiaj pensoj por momento turniĝadas ĉirkaŭ certa filo de la patro Adamo.

"Jes, estu certa pri tio, Emma, ke estis "Belega Bengtsson"*, kiu ŝtelis nian ŝinkon pasintan Kristnaskon."

"Kompreneble", diras Emma, ŝia asistanto, "sed dank' al Dio, ke li fine estas firme enŝlosita. Nun li havas tempon por pripensi siajn pekojn."

"Kiom malbona estas la mondo!" ĝemas Ada, kaj enfornigas grasan meleagron. — "Plena de ŝtelistoj, murdistoj kaj"

La pordo klakbrue malfermiĝas.

"Ĉielo, kiom vi timigis min, knabino!"

"Ada, Ada", ekkrias Vivi gaje, "pruntu al mi vian mantelon!"

? ? ?

"Tiun longan, malnovmodan, vi ja scias...."

— "kiun mi heredis de mia patrino", aldiras Ada kaj forviŝas larmon el okulo per la pottuketo. "Sed, mia Dio, por kio vi do uzos ĝin?"

"Tion mi ne volas diri. Vi poste ekscios."

— — — —

*) En la lastaj du jaroj "fama" ŝtelisto sveda.

La kandeloj de la kristarbo brilas. Regas ĝojo kaj festa humoro. "Ĉu la koboldo baldaŭ venos?" demandas Ulla kaj Bo malpacience kaj esperplene rigardas al la pordo.

Sed Vivi ne sopiras al koboldo. Kion signifas tia figuro, kiam oni ne estas tute ĝoja. Li ja ne povas konsoli koron plorantan. Imagu, neniue letero de Sven, eĉ ne karto kun deziro pri feliĉa Kristnasko. Nu, eble venos morgaŭ! Je Kristnasko ja ofte okazas malfruiĝo de poŝtaĵoj. Sed li tamen devus esti sendinta sian saluton tiom frue, ke ĝi estus alveninta al ŝi ĝustatempe.

Fine do venas la koboldo, maljuna, kun longa blanka barbo, ruĝa ĉapo, granda sako sur sia kurba dorso kaj la plej ridiga el ĉio . . . ĝispieda malnovmoda mantelo, verda pro aĝo, senmanika, kun tri grandaj kolumoj kaj du truoj por la manoj. La infanoj estas ravitaj, ankaŭ al la plenkreskuloj la kobolda apero kaŭzas multan plezuron. Eĉ Vivi korege ridas pro la komika figuro, forgesante por momento sian kordoloron. Ada kunfrapas la manojn kaj ekkrias: "Ho kara!" kaj avino pensas: "Karl Johan ja estas mirinda knabo. Kiom majstre li ludas sian rolon! Kiom bone li trompsanĝas la voĉon!"

La koboldo malavare disdonas pake-tojn el sia granda sako. La infanoj estas superŝutataj per ĉiuspecaj aĵoj kaj ludiloj, kiujn ili kompreneble tuj volas provi. Jen flugmaŝino zumas en la ĉambro, aŭto kuras sur la planko, hundo bojas kaj svingas la voston kaj pupo krias "panjo".

Ankaŭ Vivi ricevas multajn donacojn, tamen ŝi ne tute povas ĝoji pri ili. Sed fine la koboldo prenas el sia sako malgrandan paketon, kiun li transdonas al ŝi. Ekbrilas la okuloj de Vivi. Ĉu vere? Jes, staras: "Feliĉan Kristnaskon deziras Sven." Kia agrabla surprizo! Li do ne forgesis ŝin. Estas kvazaŭ ŝtono falus de ŝia koro. Ŝi sentas, kvazaŭ ŝi volus ĉirkaŭbraki la koboldon kaj la tutan mondon.

"Nun la sako estas malplena", diras la koboldo. "Kaj nun mi devas foriri".

"Ne foriru!!!" plengorĝe krias la infanoj. "Restu, restu!!!"

Tiam subite la kobolda masko defalas.

Ne estas facile diri, kies miro estis pli granda, tiu de Bo kaj Ulla, kiuj en

la koboldo ektrovas ordinaran homon. aŭ tiu de Vivi, kiu ekvidas antaŭ siaj okuloj . . . Sven.

Kia sensacia surprizo! Kia gaja renkontiĝo! Avino dolĉe ridetante balancas la kapon, Ada aspektas treege fiera pro la honoro, kiu estas montrata al ŝia malnova mantelo kaj Karl Johan, kiu ĵus ŝteliĝis por vidi la efekton de la neatendita surprizo, triumfas. Kia bonega ideo! Kaj kia bonŝanco, ke Vivi ne estis la unua, kiun Sven renkontis, kiam li aperis en la vespero por surprizi kaj deziri "Bonan Kristnaskon!" Panjo tuj volis konduki lin al Vivi, sed Karl Johan diris: "Ne montru vin tuj! Mi havas bonegan proponon. Vi prezentu koboldon!" Kaj tiel okazis, ke Sven prenis sur sin la rolon de la kristnaska koboldo.

Fariĝis gaja vespero. Vivi neniam travivis tian mirindan kristnaskan feston.

Ella Nilson.



Lexicon — det nya spelet.

För över ett halvår sedan introducerade vi här i landet det nya spelet Lexicon, vilket uppfunnits i England och omedelbart utgavs även på esperanto. Lexicon är ett bokstavsspel och spelas av 2 eller 4 personer. På varje kort finnes en bokstav och det gäller att av de kort varje spelare får kombinera ord (vissa regler för vilka ord som äro tillåtna och huru de få bildas måste iakttagas). Den som först blir kvitt sina kort har vunnit spelet och de övriga få betala poäng efter värdet av de kort som de ha kvar på hand.

Lexicon är ej blott ett roligt utan samtidigt ett nyttigt tidsfördriv. Förmågan att finna nya ord och ordsammansättningar uppövas.

Skaffa Eder Lexicon till de långa vinterkvällarna. Pris 3 kr. pr spel i elegant etui.

Rekvireras från Förlagsföreningen Esperanto.

Franska luftfartsministeriet utnämner esperantorepresentant.

Franska luftfartsministeriet har utnämnt direktören för väderlekstjänsten general Delcambre till sin representant hos Franska föreningen för esperantopropaganda i alla ärenden, som angå luftfarten.

La Ĝardeno.

En la kronikoj de la historio ni ĉiam haltas antaŭ la plej potencaj personoj, kaj kun admirantaj rigardoj ni observas ilin. Ĉiu linio, ĉiu nuanciĝo en iliaj vizaĝoj donas adekvatan esprimon al la sublimo, la noblo, la puro kaj la bono. Neniu ombro malheligas la bildon. Ĉiu staras antaŭ ni flame hela. La pasinteco logaperas.

Sed se tiuj personoj estus metitaj antaŭ nin tute vivantaj, kaj ni povus vidi ilin en ilia ĉiutaga agado, kun iliaj pure homaj bezonoj, mankoj kaj neperfektaĵoj, ni irus al ili renkonte kun deteniĝo kaj certa singardemo. Ni ŝparus laŭdajn vortojn. Prefere ni notus al ni iliajn malfortaĵojn, kaj tute certe ni haltadus en la ombraĵo de ilia vivo. Per tio ni atingis al la nuno.

La homo havas nekredeblan kapablon, ke li povas rigardi antaŭen kaj malantaŭen en la tempo. Estas, kvazaŭ al la nuno mankus poeta inspiro. Kiom ofte la homo reve iris returne al la "bona malnova tempo". Se oni prenis tute serioze tiujn vortojn "la bona malnova tempo", oni venus al la ĝojiga konkludo, ke la mondo ĉiam estas, estis kaj estos bona, ĉar generacio post generacio ja trumpetadis tion al sia samtempularo.

La paradokso tamen frapas nin rekte en la vizaĝo.

Ke ni en nia tempo ne estas kontentaj pri nia vivo, ja povas havi pravecon. Tiuj banaleco kaj trivialiĝo, kiuj nun regas ĉie, ne posedas stimulan influon al la trankvilo kaj feliĉo de la animo. La raciigo en la spirita industriismo atingis sian kulminon, kaj ni sentas ĉiam pli kaj pli, kiel meĥanikiĝis la enhavo de nia vivo. Pro tio ni tiel volonte rifuĝas en la pasintecon. Sed ĉu tio estas ĝusta? — Ĉu ni ne prefere devus ĵeti nin en la nunon, meti flanken ĉion alian kaj kun nevenkebla kuraĝo komenci la laboron pri la estanteco? Se ni estus pli frue direktintaj niajn pensojn al tio, eble multo el la "bona malnova" povus esti savita, kaj ni jam ne bezonus sopiri pri la tempo pasinta. Tiam la pasinteco kunfandiĝus kun la nuno kaj formus homogenan koncepton pri la vivo.

Ni povas preni ekzemplon.

Rava, bela ĝardeno estas la objekto de nia rigardado. Kun certa sento de pieca sindonemo ni iras sur la novrastitaj sablovojetoj, la suno ludas tra la branĉ-

aroj, la floroj odoras, kaj kun admiro ni glitigas la rigardojn sur la bone flegita fragbedaro kaj la bonorditaj frambuoj. La pomarbaj floroj brilas blankaj, kaj la siringa heĝo staras kiel potenca murego kontraŭ la mondo ekstera. Ĉio estas flegita kun la plej grandaj zorgo kaj atento. — La tempo pasas, kaj ni staras rigardante la saman ĝardenon. Sed nun la sablovojetoj kuŝas kunkreskintaj, la ĉielo estas malhela kaj malgaja, mankas floroj, kaj kie iam troviĝis la fragbedaro kaj la frambuoj, nun staras torditaj budaĉoj. La pomarboj estas for, kaj de la siringa heĝo ne troviĝas postsigno.

Tiam ni tuj pensas returne tra la tempo kaj rememoras la ĝardenon, kiam ĝi estis en sia florado. Kun la manoj en la poŝoj ni restas, miskontentaj pri la dezerteco. Sed ni faras nenion por rebonigi la abomenindaĵon. Ni nur fondiĝas en la memoro pri la malnova, floriĉa ĝardeno. Ni ensorbas la atmosferon de la pasinteco.

Anstataŭ tiu agmaniero, kiu sendube estas la plej simpla kaj komforta, ni eklaboru per freŝaj fortoj por ekkulturi novan ĝardenon, same belan kiel ĝia antaŭulo. Kaj tiam la pasinteco kaj la nuno kunfandiĝos en unu tuton. Tiam ni ne plu bezonos ĉagreniĝi pri la nuno kiel pri io malbela kaj malagraba, sed ni ĝuste taksos ĝian veran ĉarmon kaj ni ŝatos tiun kontentiĝon, kiun ĝi tiam donacos al ni.

Kun la permeso de la aŭtoro tradukis
B. Gerdman.



Pola turisma servo.

Nove kreita en Varsovio granda turisma kooperativo "Detur" ofertas specialajn servojn al esperantistoj. Bonegaj gvidistoj parolantaj esperante atendas alvenantojn. Por ĉiu petanto oni senpage prilaboras planon kaj kostkalkulon de iu ajn pridemandata ekskurso en Pollando. Skribu al "Detur", Warszawa, Sienna 4, Pollando, kaj postulu prospektojn kaj informojn en esperanto, provu al "Detur" utilecon de nia lingvo.

Korespondado.

S-ro Macuo Sato, Obihiro Poŝtoficejo, Tokaci-provinco, HOKKAIDO, Japanujo, deziras korespondi per leteroj aŭ kartoj kun gesamideanoj en Svedujo. Garantio pri respondo.

Studieråd.

Ur Dr. A. Möbusz lärobok *Universala Esperanto Lernolibro* hämtas följande, som är värt beaktande av envar:

1. Esperanto är ett mycket lätt språk, men det är nödvändigt, att du lär dig det med allvar och flit.
2. Sluta inte studera, om du av någon anledning hindras deltaga i en lektion.
3. Ägna åtminstone 10—15 minuter varje dag till studium av Esperanto.
4. Om det är något, som du inte förstår, var inte rädd att fråga ledaren.
5. Tala utan rädsla esperanto, även om du gör fel. De övriga i kursen äro inte heller perfekta.
6. Läs och lär hemma alltid med hög röst, för att tunga och öron måtte vänjas vid de främmande ljuden.
7. Lär dig ofta något utantill, särskilt talvändningar.
8. Lär dig orden väl. (Gå så till väga, att du först med handen eller ett papper täcker över de svenska orden och försök översätta esperantoorden. Ord, vars betydelse du inte genast kommer ihåg, bör du stryka under och repetera ofta. Täck sedan över esperantoorden och gå tillväga på samma sätt.)
9. Översätt alla uppgifter först muntligen och sedan skriftligen.
10. Då du läser böcker, tidningar o.s.v. stryk då under de ord, som du ej känner till, skriv dem med översättning i en bok och läs igenom dem då och då. Endast på det sättet skaffar du dig ett tillräckligt stort ordförråd.

Så ska' det skötas.

Den lokala propagandan för esperanto är oerhört viktig. Att våra intresserade arbetare i vingården insett detta ha vi många bevis på, inte minst i de mångestades välredigerade esperantospalterna i dagspressen. SEGIS utför i detta fall även ett utomordentligt arbete, som ej nog kan värdesättas och understödjas. En utmärkt idé är även nedanstående som vi återgiva här:

Rektor Sam Jansson!

"Undertecknad, som under mer än ett halvt år redigerat en esperantospalt i Blekinge Läns Tidning och Ronneby Tidning (den förstnämnda den största

och mest spridda tidningen i Blekinge) har, med anledning dels av esperantokongressen detta år, och dels för att i största möjliga omfattning sprida kännedom om esperantorörelsen, gjort avtal med huvudredaktören för ovanstående tidningar om införandet av en serie artiklar av esperantorörelsens förgrundsmän i Sverige. Jag vore därför synnerligen tacksam om — — — ville vara vänlig skriva en artikel, omfattande omkring 100—150 rader, t. ex. om hur elementär- och fortsättningskurserna förlupit eller något liknande. I och för framställandet av en porträttkliché, som är meningen att infällas i texten, vore jag synnerligen tacksam om — — — under några dagar ville låna mig sitt fotografi — — —.

Altestime K. L. Nilsson,
Karlskrona.

Jul- och nyårskort.

Av årets nyheter ha vi gjort ett urval av de allra vackraste, av vilka för vår räkning tryckts en särskild upplaga med text på esperanto.

Julkort.

- Brevkortsformat. 5 olika motiv
Pr st. 10 öre.
- Miniatyrkort (7×10,5 cm.). 7 olika.
Pr st. 6 öre.
- Visitkortsformat, dubbla (4,5×9 cm.)
med kuvert, mycket omttyckta. 6 olika.
Inber. kuvert pr st. 10 öre.

Nyårskort.

- Brevkortsformat. 5 olika motiv.
Pr st. 10 öre.
- Visitkortsformat. 5 olika motiv. dubbla,
med kuvert. Inb. kuvert. Pr st. 10 öre.

Jul- och nyårskort med text "Bonan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron" i grönt tryck med esperantoflagga. Pris med kuvert pr st. 8 öre. Pris pr dussin lika med 10-priset.

Återförsäljare antagas. Beställ i god tid!

Förlagsföreningen Esperanto
Box 698. Stockholm. Postg. 578.
Tel. 31 65 01.

LIBROJ KAJ GAZETOJ

SVEDA ANTOLOGIO. En nia lasta numero aperis rezenco pri Sveda Antologio. Iamaniere el la rezenco foriĝis tiu parto, kiu rilatis la viglan, talente verkitan bonegan enkondukon de magistro Beckman pri la sveda literaturo. Nun ni kompletigas tiun bedaŭrindan mankon kaj ni rekomendas al ĉiuj niaj legantoj atente legi tiun eminentan verketon, kiu tiel vive gvidos nin en la koncernan svedan literaturon.

Mi.

J. M. ROSENÖRN: *Amelia kaj Marina.* (Amatora poezio, 166 p. Prezo: 3 sv. fr.)

Konfeso de homo, kiu preskaŭ ĉiujn, kiuj al li estis karaj, perdis. Kaj la senpera sincereco donas valoron al tiuj ĉi strangaj poemoj, kiuj sonas, kiel elkora veado, sen artista pretendo, sed al ĉiu kompreneble kaj kunsenteble.

F. Szilágyi.

ALFRED DE MUSSET: *Mimi Pinson.* (Trad. M. Rethel. Eld. Esp. Instituto, Venlo. 44 p. Prezo: 1:20 sv. fr. + 10 %)

Plezure ni legis la facilan, ĉarman rakonton de la romantike bohema franca poeto. La traduko ĝenerale bone harmonias al la tono de la originala novelo.

PETRO. (Kursa lernolibro por laboristoj. 6-a eld. de SAT. 116 p. Fr. fr. 6:—.)

Preskaŭ senŝanĝa, konvena teksto por komencantoj, sed la bildojn oni devus iom plibonigi. Ili nur tiam valoras, se ili efektive klarigas kaj ŝparas al la lernanto la uzon de vortaro. Sed tio tamen ne tuŝas nian opinion pri la konvena esenco.

F. Szilágyi.

P. JIL-GILLE: *Skizo pri filozofio de la homa digno.* (Trad. E. Lanti. Eldonis SAT. 148 p. Prezo fr. fr. 12:—.)

La libero, la frukto de la progreso kaj la celo de la homa digno ne estas la "egocentrismo" de la individuistoj, sed ĝia direkto montras al la sociemo. Laŭ la optimista filozofio de Gille la vivo devas humaniĝi, reakiri la homan dignon per la forto de la klariga, abstraktiga intelekto. La verko estas pensiga, logika kaj malgraŭ la abstrakta enhavo, ne malfacile komprenebla. El la lasta merito ni devas doni parton al la klara tra-

Nenio estas el ni.

Matena suno forgratas mallumon de la ĉielo

*kaj silentas en stelaj gorĝoj la kanto.
Maturaj falas el la viva arbo la tagoj,
sur mola tapiŝo de mallumo trovotaj,
kiam volas rikolti ilin
la noktaj kantbirdoj
en siajn lumajn bekojn.
Kuşas en manoj de Dio
nia rikoltata rikoltemo:
malgranda pensero,
flugilo de animoj,
radiojn elsemantaj perlbutonoj
sur la kostuma maniko de nokto,
bela sunfloro
vaporanta bonodoron ĝardene en la koro
de Dio.*

Nenio estas el ni.

*Sed el niaj okuloj ploras la ĉielo sian
ĝojon.*

Carl Elof Svenning.



Zamenhof-horo en radio.

Okaze de la 75-jara datreveno post la naskiĝo de nia Majstro, la Litova Radiofono en Kaunas (ondo 1935) transligos sabate la 15-an de decembro, de la 7.30 ĝis 8.30 horo vespere (laŭ la mez-eŭropa tempo) Zamenhof-horon, dum kiu parolos: s-ro Kalugin pri "Esperanto en la komenco de nia jarcento" (esperante), s-ro Lapiene "Esperanto kaj ĝia aŭtoro d-ro L. L. Zamenhof" (litove) kaj M. Duŝanski "La vivo de Zamenhof en Litvujo" (esperante). Dum la Zamenhof-horo ankaŭ estos kantado. — La samideanoj estas petataj post la Zamenhof-horo sendi dankleterojn al la Litova Radiofono en Kaunas.

duko, kiu tre malofte maltrafas. Tamen unu el la maloftaj, malfacile kompreneblaj partoj ni citas: "La homa socio tiel estas el jura esenco. Kaj estas per juraj vojoj, ke oni devas agi, se oni volas ĝin organisme modifi" *F. Szilágyi.*

Post dektrijara ekzisto la aŭstralia gazeto La Suda Kruco mortis. Ĝi estis malgranda sed bona, precipe ĝiaj librokritikoj estis tre zorge faritaj. Ĝi baldaŭ renaskiĝu!

Oni bondeziras:

Agrablan Kristnaskon kun multaj esperantaj libroj kaj feliĉan Novjaron kun sukcesa propagando por nia lingvo deziras al la sveda samideanaro

LA MORARIU-TRIO EN ÖREBRO.

Bonan Kristnaskon kaj feliĉan propagandriĉan novan jaron deziras al ĉiuj svedaj gesamideanoj kaj geamikoj

ERIKA & HENRIK SEPPIK.

Al miaj konatoj en Svedlando mi deziras agrablajn festotagojn kaj tre feliĉan novan jaron, al la kluboj kaj grupoj sukcesplenan laboron.

F. SZILAGYI.

Esperantosånger för blandad kör.

För fyra stämmor. Pris 25 öre.

Innehåller följande sånger: *Jungfrun gick åt lunden, den sköna.* — *Uti vår hage.* — *Djupt i havet på demantehällen.* — *Sankta Staffan.* — *Vi vandra genom skogen.* — *Kristallen den fina.*

Med jämnlöpande svensk och esperantotext. — Obs! Endast ett begränsat antal exemplar finnes. Beställes från

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Box 698, Stockholm 1.

La vivo de Nia Sinjoro Jesuo.

"Fakte ĝi estas unu el la plej lukse eldonitaj verkoj en Esperanto, kiujn mi konas. Oni rajte povus nomi ĝin bibliofila eldonaĵo. Ok religiaj bildoj, inter ili du de la majstroj Rafaelo kaj Lionardo da Vinĉi, ornamas ĝin."

(Heroldo de Esperanto.)

Bele bindita kr. 6.50.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Stockholm 1.

Ĉiu esperantisto, ĉiu klubo posedu la interesan kart-kvartetludon. Ĝia prezo estas nur 60 oeroj. Bonv. sendi mendon al: Willy Burgemeister, Fack 77, GNOSJÖ.

Esperantister!

Jul- & Nyårskort med namntryck i guld (Esperantotext) 25 st. 95 öre; 50 st. 1:40. Kuvert 2 öre st. Skribu hodiaŭ!

BOKINDUSTRI, Bäckaby.

Lär språk genom

European Herald

Kr. 3:30 per kvartal.

Postgirokonto 57596.

Stockholm.

Plata Pano kaj Sana Pano.

Ĉu vi scias ke granda fabriko norvega vendas en la tuta mondo du delikatajn panspecojn sub esperantaj nomoj?

"Sana Pano" estas tre bongusta "deserta" pano. "Plata Pano" estas tre maldika, luksa pano.

Prezoj: Plata Pano (pezo 300 gr.) 0.50.

Sana Pano (pezo 300 gr.) 0.60.

Minimuma sendaĵo 3 paketoj.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Stockholm 1.

Ny grammofonskiva på esperanto.

LA ESPERO och INTERNATIONALLEN finnes nu på esperanto, insjungna av La Kantobirdaro, Stockholm. Priset är 3:— kr., vartill kommer porto med 60 öre inom landet (för Danmark och Norge 90 öre). Vid rekvisition av 10 skivor 10 % rabatt. Beställ hos:

ESPERANTOSANGKÖREN

Upplandsgatan 1, Stockholm

Postgirokonto 57.650. Expedieras endast mot förskotts betalning.

Leterkesto.

W. B., GNOSJÖ. La anonco en nov. kostas neniom; la nuna 3 kr.

A. Sylwe, ALUNDA. La anonco kostas kr. 0:50.

Sveda Antologio.

Första volymen av detta stora verk som avser att för esperantovärlden presentera ett urval av vad den svenska litteraturens störste skrivit. 228 sidor. Förstklassig utstyrsel.

Pris häft. kr. 5:—, inbunden i helt klotband med guldtryck 6:50.

El recenzo:

"Ni ne devas multe paroli pri tio, kiom grava estas la apero de la Antologio por Esperanto en Svedlando kaj kiom multe signifas la verko por Svedlando en eks-terlando. Konkludo: Montru tiun ĉi libron al la skeptikuloj kaj sendu al tiuj, al kiuj vi volas konigi la kulturon de Svedlando. Kaj demandu la skeptikulojn, la malamikojn: "Kiu nacia lingvo produktis similan antologion de alia — speciale — malgranda popolo?"

Köp detta ståt'iga verk till jul!

— ★ —

Ny grammofonskiva:

De kända svenska folkvisorna

Kristalo la bela

Ni marŝas tra l' arbar

Nia arbar' (Uti vår hage—)

Körsång av det berömda Siljansbygds körförbund. (Upptagningen skedde i samband med den stora Stockholmskongressen.)

Pris kr. 3:50.

Rakklingan ESPERANTO

"La tutmonda razoklingo"

Svensk tillverkning av högsta kvalitet. Finnes även med slits.

Pris per paket om 5 st. 0:85.

Rakklingan Esperanto blir en välkommen julklapp även om mottagaren ej kan esperanto.

— ★ —

DOKTORO BENSON:

Universala Esperanto-Metodo.

Lärobok med bilder. 560 sidor.

Dr Bensons lärobok är med sina 11.000 originalbilder enastående i sitt slag. Av det rikhaltiga innehållet må nämnas en "nyckel" på 40 språk. Det är ett jättearbete författaren nedlagt på denna lärobok.

Pris inbunden kr. 20:—.

— ★ —

En trevlig sångbok

är

"ESPERANTA KANTOKOLEKTO"

utgiven av J. H. Vink.

Den innehåller 19 utvalda sånger med noter samt även illustrationer.

Pris 75 öre.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.
Box 698, Stockholm 1.

LIVFÖRSÄKRINGSBOLAGET

BALDER

Grundat 1887



LIVFÖRSÄKRINGSBOLAGET
BALDERS FASTIGHET
STUREGATAN 8, STOCKHOLM

Driftiga ombud
antagas

Ålder: Balder är Sveriges första rent ömsesidiga livbolag (rent ömsesidigt = utan förlagskapital).

Soliditet: Intet svenskt livbolag har starkare ekonomisk ställning än Balder.

Premier: Icke något livbolag kan uppvisa i genomsnitt lägre premier än Balder.

Vinst: Balders försäkrade ha erhållit större vinst och tidigare än i de flesta andra svenska livbolag. För en del äldre försäkringar har sammanlagda vinsten i Balder uppgått till 70 à 80 % av samtliga erlagda premier. Sådana resultat åsyfta specialfall och få ej betraktas som norm för bolagets vinstutdelning i allmänhet.

Försäkringsvillkor: Livförsäkring för vuxna utan läkarundersökning gälla i Balder genast till fulla beloppet vid dödsfall i alla akuta sjukdomar, således även vid epidemier. Dessa förmånliga villkor gälla utan begränsning till vissa försäkringar och visst belopp.

Konstitution: Balders försäkrade äga själva bolaget och äro de enda, som äga bestämmanderätt beträffande dess angelägenheter.

FÖRSÄKRINGSSUMMA:
Cirka **220,000,000 kr.**

FONDER:
Över **50,000,000 kr.**

SEF:s handböcker.

Svenska Esperanto-Förbundets handböcker, 1: — kr. pr st. (för förbundsmedlemmar 50 öre), ovärderliga för varje esperantist:

1. Dahl: Hur leder man fortsättningskurser i esperanto?

2. Malmgren: La Esperanto-klubo.

3. Nylén: "Lingva kvaronhoro".

4. Rosenberg--Malmgren: Per kio ni amuzu nin?

Rekvireras hos *Förlagsföreningen Esperanto*, Fack 698, Stockholm.

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

Sture-Tryckeriet, Stockholm 1934.

